

85-a naskiĝtago de T.G. Masaryk.

Th. Kilián.

Morgaŭ, la 7-an de t.m. ĝisvivos, la 85-an jaron de sia benita vivo T. G. Masaryk, la unua prezidanto de la renovigita ĉeĥoslovaka ŝtato. Ĝi estas tago, en kiu pleniĝas la koro de ĉiu loĝanto de tiu ĉi respubliko, de ĉiu loĝanto de bona volo, per sincera ĝojo kaj dankema sento.

Sed ni, ĉeĥoslovakoj, ne scias festi niajn festojn tiel gaje kaj vivece kiel la francoj kaj aliaj popoloj. Dum deksep jaroj da libereco ni ankoraŭ ne ellernis montri al la mondo nian ĝojon. Tro longe - dum 300 jaroj - ni ne havis okazon kaj kaŭzon por festado.

Ĉu mirinde, ke dum tiu ĉi malĝoja epoko la popolo serĉis konsolon en sia glora historio? Ĉu mirinde, ke tiu ĉi popolo, kiun senindulge premis fremda jugo, ke ĝi fiere legis en sia historio pri Svatopluk, kiu jam en la 9-a jarcento regis la Grandan Moravian Regnon? Kie kaj kio estis tiam la praavo de l'dinastio, kiu nun primokas lian senpovon? Ŝajnis, ke la malbona sorto decidis, ke malaperu la ĉeĥoslovaka popolo de sur la surfaco de l'tero. Ĉu mirinde, ke ĝuste en tiuj malĝojaj tempoj edifis la popolon la legado pri l'ora epoko de l' potenca bohema reĝo Přemysl? Ĉu mirinde, ke la doloranta koro rifuĝis al Karlo la IV-a, kiun la popolo nomis Patro de l'Patrujo? Al tiu reĝo, kiu donis al la filoj de l'bohema lando la unuan universitaton en la centra Eŭropo... universitato, kiu fariĝis modelo por la universitatoj Viena kaj ĉiuj germanaj? Ĉu mirinde, ke la malfeliĉa popolo spirite akompanis unu el siaj plej grandaj filoj Jan Amos Komenský, lin, la senhejmulon vagantan dum la 30-jara milito de lando al lando, lin, kiu devis forlasi la amatan patrujon pro tio, ĉar li diris la profetajn vortojn: "Mi ankaŭ kredas al Dio, ke post la paso de l'uragano, revenos la regado de viaj aferoj al vi, ho popolo ĉeĥa." Profetaj vortoj, kiuj fariĝis preĝo en la buŝo de l'kredantoj. Kaj kiam la tuta kultura mondo festis la 400-an naskiĝtagon de la granda pedagogiisto, la popolo, el kies sino li eliris, funebris, ĉar malpermesite estis ĝoji kaj festi.

Eble neniu popolo vivis tiom kaj tiel pasie kiel la nia en sia historio, fonto de konsolo, forto al rezisto kaj de nova espero. Neniu, kiu ne konas nian historion, povas kompreni nian popolon nek ĝian unuan regnanon T. G. Masaryk. Ĉar en tiu ĉi historio estas la radikoj de Masaryk kaj de lia programo esprimebla per unu vorto: HUMANECO - HOMAMO. Tia homamo, kiu devas esti la kulmina celo de ĉiu kultura popolo, por ke la interpopolaj rilatoj baziĝu sur vero kaj justeco. Kiu el ni ne pensus ĉe tiuj ĉi vortoj je alia geniulo, kies same kristalpura homamo minifestiĝis per mirinda donaco farita al la homaro: per paciga kaj fratiga lingvo internacia, lingvo esperanto.

Sian laboron al la popolo rigardas Masaryk sia morala devo. Li fariĝis la konscienco de la ĉeĥoslovaka popolo. Kiam eksplodis la mondmilito, li sciis, ke venis la tempo, kiu decidis pri la sorto de lia popolo. Sur la batalkampoj ekfuriozis la milito kaj ĝin sekvis kiel ombro la persekutado al la ĉeĥoslovaka popolo. Venis la unua verdikto: juna laboristo estis pro politikaj kaŭzoj mortpafita. Jen la unua viktimo. Simpla, nekonata viro konis sian devon. Venis la horo, kiam ankaŭ li, parlamenta deputito, devis decidiĝi. Ĉar ne estis eble labori hejme, Masaryk decidiĝis iri eksterlanden. Pure home ni rigardi tiun ĉi decidiĝon kaj ni ekkomprenos la moralan forton, kiu estis la risorto al ĉiu ago de Masaryk.

Masaryk estis tiam 65-jara, aĝo, en kiu aliaj viroj ekripozas post finita vivlaboro. Masaryk ne estis riĉa, sed por liaj modestaj pretendoj plene sufiĉis lia salajro de universitata profesoro. Lia familia vivo estis modele harmonia. Kaj nun, anstataŭ ripozi, li forlasas sian hejmon, siajn gefilojn, sian edzinon kaj prenas sur sin la vivon de senhejma migranto. Kia estos lia sorto? Kia la sorto de lia familio, elmetita al la ĉikanemo kaj vengemo de ĉiu oficistaĉo? Kia maro da amaraj sentoj plenigis la koron de lia edzino, kiam ŝi adiaŭis lin, ne sciante ĉu la adiaŭa manpremo ne estas la lasta. Sed eĉ per unu vorto ŝi, denaska amerikanino, ne provis reteni lin, sentante same la moralan devon kiel li. Vere, en tiu ĉi momento oni ne scias, antaŭ kiu pli profunde klini sian kapon: ĉu antaŭ la edzo aŭ edzino.

Li foriris, sen rimedoj kun malplenaj manoj. Kaj denove veriĝis, ke sindona, senspretenda amo pli valoras en batalo por sankta afero, ol ĉiuj trezoroj de l'mondo. Neniam li estis amiko de perarmila revolucio, sed fine li konvinkiĝis, ke la ĉeĥoslovaka popolo povas atingi sian liberecon nur per armiloj.

Li iras Italujon, poste Svisujon, veturas Francujon kaj Britujon. En Londono, kie li akceptis la al li proponitan postenon kiel universitata profesoro, li komencis febran laboron sen ripozo. Necesis unue organizi la dissemittajn kaj en multaj ŝtatoj vivantajn ĉeĥoslovakojn. Necesis organizi la ĉeĥoslovakojn-militkaptitojn en Italujo sed precipe en Rusujo, kien ili senbatale transiris en dekmiloj. Paralele kun la oraganiza laboro iris laboro propaganda, ĉar la problemoj de l'centra Eŭropo estis konataj en la cetera mondo nur malmulte aŭ tute ne. Necesis klarigi kaj motivi la ĉeĥoslovakon programon; ĝi estis: libera, sendependa ĉeĥoslovaka ŝtato. La manieron de lia propagando karakterizas lia solena deklaro en decembro 1918, kiam li estis jam prezidanto: Mi konstatas, ke dum tiu tuta tempo ni ne uzis kontraŭ niaj malamikoj eĉ unu malveron, ja eĉ ne unu el la kutimaj diplomataj artifaĵoj. Li emas aserti, ke tiel honora batalo, tiel honora revolucio estis neniam gvidata. Jen denove la konata trajto de Masaryk. Eĉ dum batalo li firme staras sur morala fundamento, bone sciante, ke ĝuste la vero estas la plej efika argumento.

Lia senlaca laboremo respeguliĝas en liaj modestaj vortoj, kiujn li, preskaŭ 70-jara maljunulo, diris en Londono al sia amiko: Eĉ ne tri noktojn mi dormis dum la du jaroj, de kiam mi forlasis mian hejmon. Gratulinda estas ĉiu ideo, kiu trovas tiajn batalantojn.

Tiu ĉi laboro necesigis ankaŭ monon. Miliono da ĉeĥoslovakoj, laboristoj kaj metiistoj vivantaj en Ameriko ekkomprenis sian devon, aranĝis kolekton kaj disponigis la necesajn sumojn al la Popola Konsilantaro en Parizo. Oni proponis al Masaryk, ke li rekte turnu sin al kelkaj ĉeĥaj riĉuloj. Masaryk rifuzis. Li diris: Mi havas sufiĉan salajron kiel universitata profesoro. Neniu devas opinii, ke li donacis al mi eĉ heleron. Ĉion ricevas la Popola Konsilantaro en Parizo. Ĉiu ĉeĥo devas koni sian devon. Mi ne skribis al la ĉeĥa ministro en Pensilvanio, kaj mi ne skribos al ĉeĥa riĉulo.

Jen fieraj vortoj: eĉ dum la epoko, dum kiu li dediĉis ĉiujn siajn fortojn al la popolo, li deziris resti sendependa perlaborante mem la rimedojn por sia vivteno.

La organizan kaj progagandan epokon sekvis epoko de militaj entreprenoj. 100 miloj da viroj memvole prenis armilojn post alvoko de Masaryk, ili venis el Ameriko, Azio, ja eĉ el Aŭstralio. 100 miloj da volontuloj estis pretaj oferi la vivon por sia popolo. Armeo da volontuloj, kiu estis pli granda ol la tuta armeo de Belgujo. Tiel impone manifestiĝis la volo de l' popolo al libereco kaj sendependeco.

Denove montriĝis, ke ideo, justa ideo, ne estas estingebbla. Kiel fajrero ĝi ekflamas en konvena tempo kaj bruligas ĉiujn remparojn kaj barilojn... kaj venkas.

La organizado de l'volontuloj necesigis la personan ĉeeston de Masaryk. Kaj ni vidas lin jen en Eŭropo, jen en Siberio kaj Rusujo, jen en Ameriko. La bona dio scias, en kiu angulo de l'mondo lin atingis la sciigo, ke aŭstra juĝejo kondamnis lin al morto ... in contumaciam.

La lasta, la diplomatia epoko kronis lian verkon: post 300 jaroj da humiligoj efektiviĝis en oktobro 1918 la profetaj vortoj de Jan Amos Komenský: Post paso de l'uragano revenis la regado de liaj aferoj al la popolo. Finiĝis la sanga buĉado. Masaryk, la prezidanto, revenis en sian liberigitan patrujon, Masaryk, la edzo kaj patro, revenis al sia familio.

Sed ne por ripozi. Novaj taskoj, nova laboro atendis lin. Jen la programo proklamita la 22-an de decembro 1918, programo de l'filozofo de demokratio fariĝinta prezidanto: "Ni ĉiuj, individuoj kaj popoloj, volas antaŭ ĉio esti homoj. Ni atingis nian celon. Ĉiuj regnantoj de bona volo, sen diferencoj de politiko, religio kaj nacieco, havas eblecon krei modelan demokratian ŝtaton, kies tasko estos, ke ĝi zorgu pri la interesoj de l'tuta, libera kaj memstara loĝantaro."

Ĝojo plenigas hodiaŭ la korojn de ĉiu ĉeĥoslovako kaj en profunda dankemo ni kliniĝas antaŭ la mistera kaj nekonata forto, kiu donis al ni tiun ĉi viron en la plej decida tempo, kiam temis pri esto aŭ neesto de l' tuta popolo.

Třebíč, 19-II-35.